



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Vojaĝado per Esperanto

Gvidoss: Milan Kolka

Komuna diskuto en la ĉeĥa. La celo estas registri videon, por ke neesperantistoj vidu, kial ni ŝatas nian lingvon.

Lingvo: La ĉeĥa

Kiam: la 29-an de marto 2022 je 18.00.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Skype

La ligilon mi sendos al vi marde.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo estos registrata.



Ni rekomendas

- **NOVE!** Trapasu **KER ekzamenon** rete. Pli da informojn vi povas legi en Edukado.net ĉe <https://edukado.net/novajhjoj?id=869>. Se vi interesiĝas pri la ekzameno, la ekzamkomisio petas vin, ke vi plenumu la enketilon ĉe <https://forms.gle/...4sagZvaeXoY9>. UEA agnoskas novajn retajn ekzamenojn.
- **NOVE!** Ekde septembro Adam Mickiewicz Universitato en Poznano planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Iлона Koutny (ikoutny@amu.edu.pl)
- **NOVE!** Por ke ni bone regu nian lingvon, ni bezonas uzi ĝin. Unu eblo de uzo estas legado de esperanta literaturo. Bedaŭrinde pro sendokostoj homoj preskaŭ ne aĉetas alilandan E-literaturon. Nia klubo povas al vi peri aĉeton de libroj el **Bjalistoka e-butiko**. Rigradu en [ilian retpaĝaron](#). Se vi tie trovos ion, kin vi volas, bonvolu skribu al mi. Kondiĉoj: al kosto estos kosto de la libroj (eble mi recovs rabaton) + kontribuo al internacia sendokostoj + 20 Kč por la klubo + sendokostoj en Ĉeĥio. Eblas sendi per Česká pošta, Zásilkovna kaj transdoni en la klubejo (sen sendokosto). Baldaŭ en la stoko aperos nova eldono de **Vojaĝo al Kazohinio** de Sándor Szathmári. En ilia stoko estas haveblaj ankaŭ novaj eldonoj de verkoj de **Julio Baghy**. Se vi hezitas, ĉu aĉeti, ni citu Tomasz Chmielik: “Aĉetu verdajn librojn, eĉ se vi ne volas legi ĝin.” Sed prefere aĉetu kaj legu. Nur tial vi povas daŭrigi eldonadon de esperanta literaturo.

- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĒDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice
- **Instruado de Esperanto en Bartošovice okazonta komence de aprilo estis nuligita.**



Programo en aprilo

La 5-an **Otakar Batlička, ĉeĥa Jack London** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

La 12-an **Homa cerbo kaj esploroj de atentemo kaj memoro** – Josef Vojáček. rete per Skajpo

La 19-an **Refleksivaj pronomoj** – Milan Kolka, ekzercoj. Občanský klub, Hybešova 65a

La 26-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita.* rete per Skajpo

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de aprilo kaj por majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto